

POEMOJ

el Cezario



Volumo 01

R I M P O E M O J D E C E Z A R

Adiaŭ!

Alia mondo eblas

Alte flugantaj pensoj

Amdeklaro

Ankoraŭ dormeme

Balkona alvoko

Bani sin en lago

Biletkontrolo

Cigno majesta

Ĉaplino en Parizo

Ĉeriza flortempo

Demandantaj vokaloj

Devo kaj revo

Dioj bedaŭrinde ebriaj

Elektu saĝe vian retikulon

Finna benko – fina venko

Fino de heliko

Ĝuu ĝojajn momentojn

Husaro

Kio ĝi estas?

La monatoj

La pensulo

Lernu Esperanton

Logiko de araneo

Lumo kaj ombro

Malnovaj domoj

Neĝoreĝo

Ne lasis ni la koron en Parizo

Ne pretekstu poezio

Ne ŝovu vian nazon...

Nubofantazio

Nuboj

Nur gastoj surtere

Pacon ne nur je Kristnasko

Papilia fantazio

Pensuloklubo pensas

Plenlune

Policisto nr-o 285

Povra poeto

Preskoboldo

Printempo estas juna vir'

Revina

Revoluciulo Mort'

Ruinsorĉo

Semajno de nelaboremulo

Senfineco

Sonĝo en sonĝo

Spuron mi pentras, mian propran

Suno kun verdaj okuloj

Urbomuzikistoj de Bremeno

Vakaj seĝoj

Vi, mia certo

Voko de l' papilio

Adiaŭ!

Lin paralizas la solec'.

Taverne sidas vir'.

Li trinkas brandon sen aspir'.

Li ne plu estas edz'.

Li kaŭras morna en delir'.

Li estas sola gast'.

Li trinkas plu kaj plu sen hast'.

Desperas tre la vir'.

Ŝi estis rava, sed balast'

de l' koktelej' Mister'.

Ŝi iris for sur nigra ter'

al rok' ĉe l' bord' sen hast'.

Kun pajlĉapel' kaj lipomord'

ŝi staras kun ekzalt'.

La mevoj krias jen sen halt'.

Kirliĝas pensoj kiel hord'.

Cerbumas ŝi sen iu far',

sed preskaŭ svenas ŝi.

Êu êi tuj saltos tie êi
elalte al la mar'?

Alia mondo eblas

Printempe ĝi palpeblas,
alia mondo eblas.
Florado estas kri'.
Sub arbo oni festas.
Printemp' ribelo estas,
naturrevoluci'.

Burĝonoj fine krevas,
el grizo sin eklevas,
jen kreskas la esper'.
Je floroj jam palpeblas,
ke mond' alia eblas
sur nia tuta Ter'.

Printempkantistoj trilas,
muziko ekbabilas,
rondiras kun la vent'.
Dum la printemp' palpeblas:
Alia mondo eblas,
tutnova mond' laŭ sent'.

Alte flugantaj pensoj

Mi flugas alte en aer',
ne rampas kiel verm' sur ter'.

En mia propra alta sfer'
mi estas aglo de liber'.

Se vi ne alte flugas, hom',
vi estos ĉiam verm' en dom'.

Ekflugu do kun fantazi',
libero estas, hom', vizi'!

***PS:** Mi verkis la poemon por foto de la izraela esperantisto*

*David. La foto montras alte flugantan aglon inter nuboj kvazaŭ
kronata de vespersuna aŭreolo.*

Amdeklaro

Dolça bekulino,
kulmino de fascino,
êe via hela flanko
feliças mi kun danko.

Mia dolça kara,
vi estas senkompara.
Pro via bel' anime,
mi amas vin senlime.

Ankoraŭ dormeme

Mi dormas plu en sonĝ' en plaĝa land',
sed vekas min kukolo je la vand'.

Mi kuŝas en hotelo sen furoro.

En banoĉambro ludas jam muzik',
jen ĵaz' libera, buntaj sonoj, ŝrik',
vekigas min trumpet' dum frua horo.

Mi kuŝas do en mola varma lit'.

Salutas koko korte sen hezit'.

Mi restas tamen tute sen fervoro.

En mia kapo bruas moka kant',
ke nia tuta vivo estas vant'.

Aŭskultas mi, forlogas min memoro.

Okulojn miajn frotas mi sen ĝoj',
hieraŭ longdistancis nia voj'.

Mi dormus tre volonte tutan tagon.

Sed ne por dormi estas forpermeso.

Ĉar ni modernas, vivas ni en stresoj.

Kaj do akceptas streson kiel plagon.

Balkona alvoko

„Venu al mi,
venu al mi,
sed ne tie ĉi;

venu tra l' pordo,
sed ne kiel hordo
al mamzona bordo.

Venu al mi,
venu al mi
atendas vin mi.“

Tion pensas ni,
sed ne ŝi.
Ŝi pensas
pri Franci'.

PS:

La foto estas de brusselslife, ĝi montras teatrobalkonon kun tri mamazonoj en la koloroj de la franca flago, solidare al Parizo post teroratako.

Bani sin en lago

Ha, la akvo nin forlogas.

Tio ne laŭplanas.

Mi kaj Donjo kuras lagen.

Ni nin tuj ekbanas.

Ni demetas niajn vestojn,

restas nur la nudo.

Hop, la akvo ŝprucas, plaŭdas,

kia bela ludo.

Ni kuŝiĝas sur herbejo

en la suna helo.

Ie en la lagomezo

lumas blanka velo.

El la akvo kaptas aglo

karpon kun furoro.

En la alta nest' sur arbo

pepas idoĥoro.

Pro la ard' de sunaj kisoj

baldaŭ ni ekruĝas.

Ni nin sentas kiel kankroj,

en arbaron fuĝas.

Biletontrolo

Vizaĝoj en la tram' dum hor'
rigardas pro lac' kun rifuz'.
Silento frida kun fervor'.
Evitas min ĉiuj kun ruz'.

Mi estas sen veturbilet'.
Kontrolas antaŭe jam dam'.
„Evitu gapi do al ŝi“,
tamburas kompate la tram'.

„Bileton petas mi, sinjor“,
postulas de mi la fraŭlin'.
„Ho, kara, kial la fervor'?
Paŭzetu pri via rutin“!

La ino tiras min ĉe l' brak'
„Vi estas, karulo, ne Di'.
Ĉu tio estas via jak'?
Ekstaru kaj venu kun mi!

Mi trotras kiel hund' post ŝi.
Elpaŝas la in' kun plezur',
ridetojn ĵetas eĉ al mi,
sed kien ŝi gvidas min nur?

Cigno majesta

De fore hundoj bojas,
por kio tiu plag'?
Ĉe lago mi survojas
kaj grumblas plu dum vag'.

La bluaj montoj foraj
ne montras sin al mi,
nur hundoj tre senkoraj
bojadas pro envi'.

Jen drivas cigno bela
proksime en la lag',
la svelta besto hela
eklumas kiel tag'.

Mi haltas do, ekrevas.
Mi ĝojas pri la best'.
La kolon ĝi eklevas
fiere kun majest'.

Ĉaplino en Parizo

Kara mimo en Parizo,
Chaplin sur la strato,
mi por vi poemon skribas
kiel via frato.

Mi pri vi nenion scias,
eĉ ne aŭdas vorton,
sed amiko, mi admiras
vin kaj vian forton.

Homo rara vi ja estas,
pantomima grando,
kun melono sur la kapo
belo de la lando.

Via mondolingvo gesta,
via palpebrumo,
montras, ke la homo estas
pli ol nur kostumo.

Kiel vi la kisojn ĵetas
en pariza parko,
tio estas majstroverko
ne de iu ŝarko.

Tio estas ja mesaĝo
el pli bona mondo,
mi vin dankas, kamarado,
tramp' kaj vagabondo.

Restu forta, mi deziras,
kontraŭ sentdetruo,
per silentseren' elkore,
meze de la bruo.

Ĉeriza flortempo

Ni, kiel juna paro,
ruĝiĝis jam pro vort'.
Ni kisis nin sen tord'
kaj preskaŭ sen komparo.

Mi devas ne mensogi,
vi estis ĉarmulin'.
Vi sciis min forlogi,
ridete tiris min.

La ĉasto pro hontemo
en tiu arbflortemp'
ne estis fenomeno,
sed parto de l' printemp'.

Pro tiu am' rapide
frapegis nia kor'.
En tendo kun furor'
ni tuŝis nin konfide.

Vidante ĉe la reloj
florblankon en la vent',
ni sentis nin pro l' splend'

parencaj al anĝeloj.

Necesis eĉ ne revoj.

Miraklis ĉiu tag'.

Ni ŝvebis laŭ imag'

dum la ĉerizflorkrevoj.

Rimarko: Eĉ multajn jarojn poste ni volonte pensas plu pri tiu nia anĝeleca tempo inter multaj blankaj ĉerizfloroj, kiam ni troviĝis kvazaŭ en ŝvebanta stato, ĉiam duonan metron super la tero. (cez)

Ĉu krizo? Ja kiu krizo?

Ĉu krizo? Ja kiu krizo?

Tio glitas de mi
kiel de muro pizo.

Biero plu riĉe fluas
kaj la futbalo bruas,
tial mi la vivon ĝuas!

Kaj tiom longe, kiom
mi dormoĉapon havas,
viv' dum krizo min eĉ ravas!

PS: La germana Mikelo, simbolo por penspigrema, nerevoluciema, nepolitika, nelerta kaj malmoviĝema viro, konata ankaŭ kiel eterna frekventanto de bierujoj, komence vestita kiel kamparano kun dormoĉapo surkape, tiu ofte primokata ulo el la tempo antaŭ la revolucioj en la jaro 1848 sed ankaŭ pli poste kaj eĉ nun ankoraŭ primokata ulo, estas la modelo por tiu ĉi poemo, kiu certe taŭgas ne nur por germanoj. Tiaj ŝtipkapuloj, kiaj estas jam kontentaj se ili povas ĉiutage unufoje ebriigi sin en bierujo kaj gapi ĉiusemajne futbalon en tv-elsendoj estas ĉie surtere troveblaj, kvazaŭ

fihherboj, kiuj neniam tute forigeblas. Kaj por diri la tutan veron: en preskaŭ ĉiu viro en iu angulo de ties koro kaŝiĝas kaj ĉeokaze montriĝas la germana, rusa usona aŭ franca aŭ- kion ajn- Mikelo, eble sub alia nomo, sed tute certe de la sama speco. Do , ankaŭ en mi mem. Kion fari? Neniu estas perfekta, eĉ ne tiuj, kiuj imagas tion ĉeokaze.

Lilia Ledon, fejsbukamikino, klarigas la celon de la poemo en la grupo Esperanto-Poemoj-Poetoj eĉ pli bone ol mi mem, tial mi aldonis la klarigon pri du kategorioj de homoj: „Skeme :

Kategorio 1 = bohemianoj = konscio pri la sociaj absurdaĵoj, rifuzo partopreni en ili k praktika aplikado (kontraŭstarema k defia) de aliaj, homaj, valoroj (individua libereco, ekz.) + certa kvanto da sufero/amareco.

Kategorio 2 = Mikeloj = konscio nur pri si mem en rilato al la tujaj bezonoj + nenia konsciencriproĉo (k tiun parton ĉiuj homoj havas en si, jes ja.)

PSS: *La poemo ekestis pro instigo fare de fejsbukaktivisto Hans-Jürgen Inden.*

PSSS: *Verkita laŭ proverbo de Zamenhof.*

Demandantaj vokaloj

Kia, kie, kio?

Demandas hom' pro io.

Kiu, kio, kie?

demandas homoj ĉie.

Kiel, kial, kiam?

Ne scias ni ĝin ĉiam.

Devo kaj revo

Dev' ne estas revo.
Pro la devkonspiro
estas virsopiro.

Dev' ne estas mevo.
Trejnate pri la devo,
misfidas vir' al revo.

Rev' ne estas devo.
Por revul' devvoko
estas kaŭz' de ŝoko.

Dioj bedaŭrinde ebriaj

Vagadis iam Iĥtireks'
en la areo de kompleks'.
Rezulte kaptis lin perpleks'
kaj li kurbiĝis laŭ refleks'.

Sed proksimiĝis eĉ enflug'
kun fulmrapido Pekinug'.
L' terenon, lin eĉ sen hezit',
ĝi voris tuj kun apetit'.

La ĉionpova Superreks'
ekvidis ĉion tra konveks'.
Laŭ spegulbild' de l' lentofagoj
li notis ĉion tuj sub „Plagoj“.

De l' skribskrapista Supra Maks'
eliris urĝa fi-fa-faks':
„Dioj dormas pro ebri' -
sed esperu plu ni.“

Elektu saĝe vian retikulon!

Krokodila retikulo
ne plu estu, jen postulo!
Se ĝin krokodilo vidos, ĝin
neniu fort' plu bridos.
Jen ĝi voros vin, ho, homo,
aŭ ĉe lag' aŭ eĉ' en domo.

Fantômas

(por foto de Katalin)

Jen iras viro tra muro,
en kriminala epok',
timigas nin sen mezuro,
paligas nin dum ŝok'.

„Sed kion celas vi, viro,
el transa mond' kun fervor'?
Nu, Fantômas, kavaliro,
kaj majstro de l' horor'!?”

Respondas li sen cerbumo:

„Por kio mia skulptur'?
Por kio venenparfumo?
Nu, nur pro plezur'.”

Finna benko - fina venko

Ŝi sidas sur la finna benko
kaj pensas pri la fina venko.

Ĉu ĝi, la fina venko venos,
ĉu ŝin la nepoj iam benos?

Sur finna benko, ŝi do sidas
kaj pri si mem ankore ridas.

Ĉu fina venk' la homojn ligus?
Ĉu ĝi ne male nin intrigus?

Ĉar, se ni venkus, iuj perdus,
la mondo ne por ĉiuj verdus.

Prefere revu ni sur benko
pri amkunec' sen glora venko.

*PS: La poemo ekestis ĉe la rigardado de foto de esperantistino
Maria Lucchi, kiu sur finna benko revis pri la fina venko.*

Fino de heliko

Heliko venis al la limo
kaj tie pensis tuj kun timo,
ke ĝi ja ne limako estas.
Ĉu ne pli saĝus, se mi restas?

Ĝi rampis tamen trans la limon,
plu sentis en la koro timon.
Jen kaptis ĝin la doganisto,
tre alte ranga oficisto.

„Vi kial portas domon, besto?
Kun hejm' vi estas, sed sen vesto?“
„Mi, la helik', laŭlime iras
kaj iom da aero spiras.“

„Ĉu vi por via domo pagis
aŭ simple trans la limon vagis?“
„La pluvo min ĉe l' pago ĝenis,
egale kiom ajn mi penis.“

„Vi ŝajnas lerta mensogisto,
eĉ ne limak' laŭ mia listo,
mi metos vin al la serpento,

atendos vin venena dento.“

Kaj kiom ajn la kara petis,
la oficist' ne helpopretis.
Li ŝtopis ĝin en etan glason
kaj eĉ ne sentis embarason.

La domo ĝian vivon prenis,
ĉar la helik' kun konko venis.
Se ĝi alvenus tute nuda,
li eble malpli estus kruda.

Ĝuu ĝojajn momentojn

La florojn ŝatas kaj la urso
kaj estro de bonfartokurso.

La urso sian vivon ĝuas,
dum ni, la homoj, ofte bruas.

Odorojn ĉiu urso ŝatas,
jen signo, ke ĝi homojn fratas.

La ĝoj' ne estas nur homeco,
ĝi estas universa deco.

Husaro

(pri heroo)

La husaro sur cheval'
mortis iam en batal'.
Jen en valo kuŝas li
pro patria sentebri'.

Husareto estis li
infanete eĉ kun kri'.
Sur la karusel' foire
li atakis jam tre vire.

Kio ĝi estas?

Ĝi gvidas vin al foraj landoj
kaj hejme restas sur la lok'.
Ĝi marŝas eĉ tra dikaj vandoj,
al ĉiuj homoj de epok'.

Ĝi flugas tra la temp' sen limoj,
sur strangajn padojn de montar'.
Vojaĝas vi kun ĝi sen timoj,
eĉ sur insulo en la mar'.

Ĝi portas vin sur sorĉĉevalo
al diotemplo en ĉiel'.
Ĝi estas via rel' en valo
kaj riverege ora fel'.

Ĝi estas io, kio ravas,
ĝi malaperas en desper'.
Ĝi estas ilo, kiu gravas,
en kiu ajn pensebla sfer'.

Ĉu scias vi, pri kio temas?
Ĉu vin forlogis iam ĝi?
Ĝi diademas kaj blasfemas;
ĝi estas - nia fantazi'.

La monatoj

Januaro -
nova jaro.

Februaro -
febromo!

Marto, jen prin-
tempa starto.

En aprilo
birdotrio.

Ruĝa maj'-
pro iluzio.

En junio
junas ĉio.

En julio –
reĝebrio.

En aŭgust'
eĉ daŭras tio.

En septembro
ekaŭtunas

kaj oktobre
laste sunas.

La novembro
tembre petas,

ke decembro
vintropretas.

La pensulo

Mi pensas kaj pensas:

Ĉu pensoj sensencas?

Ĉu pensoj utilas,
se hom' nur babilas?

Ĉu movi do manon?

Ĉu baki la panon?

Ĉu pensi kaj sidi
sen krei aŭ ridi?

Ĉu pensi sen agi?

Nur pense do vagi?

Ni pensu kaj faru,
praktike komparu!

Lernu Esperanton

Lasu lingvan vanton.

Lernu Esperanton.

Lingvo, dua en potenco,
estas monda konsekvenco.

Ĉar ĝi en la mond' radikas,
ĝi progreson jam implikas.

Homoj de la tuta tero,
lernu por pli alta sfero.

Komunume ekparolu,
pace en la mondo rolu.

Lifto por ĉiuj

(por esperantisto en Irano)

„Nia lifto ne funkcias,
nur pro preĝo! Tio fias.
La progreso tute haltas,
eĉ ne iomete saltas.“

For la ĝenan religion!
Ja ĝi bremsu plu nenion.
Lift' ne paŭzu eĉ por io,
kaj ĝi levu sin dum ĉio.

Lift' kunprenu ĉiam ĉiun,
ne preferu ian ion.
Lift' ne bremsu la socion,
ĝi ne gloru religion!

Logiko de araneo

Jen mia reto: ruzaĵo, bel'.
Miraklo de l' mondo ĝi estas.
Por l' interret' ĝi iĝis model'.
La mondo min do manifestas!

Lumo kaj ombro

Kelkaj paŝas en la lumo,
sen aflikt' kun palpebrum'.
Sed plimulto kun cerbumo
stumblas plu en la mallum'.

Tiuj en la lum' videblas,
sed ne tiuj en malhel'.
Ili por l' socio „feblas“
kaj ne scias eĉ pri bel'.

Plu en keloj homoj sidas
kiel ratoj en ruin',
sed enlume homoj ridas,
ne kun ombro vidas sin.

Malnovaj domoj

En la malnovaj domoj
maljunas ofte homoj,
plej ofte vere bonaj,
malofte fi-admonaj.

Se domo eĉ belegas,
olduloj ĝin tre flegas.
Se domoj ekformortas,
olduloj jam ne fortas.

Se idoj dome restas,
kaj en la domoj nestas,
jen daŭras homa deco
en ĝojo kaj beleco.

Se sin labor' troviĝas,
la domo kunfeliĉas.
Jen floras la ĝardeno
kaj en la domo beno.

Mia plaĉo

Se al ĉiu hom' mi plaĉus,
tio pli ol ĉio aĉus.

Tial pensas mi kun saĝo
ĉiam pri la propra plaĉo.

Kverelantojn mi ne ŝatas,
eĉ ne tempdisipe hatas.

Mi ne devas pruvi ion,
ĉar mi fidas mian mion.

PS: hati = malamegi

Neĝoreĝo

Bonan matenon, sciuro,
rigardi vin estas plezuro!
Vi en alta neĝ' saltadas,
kiam hom' kun peno vadas.

Reĝo de la neĝ' vi estas
kaj la vintron vigle festas.
Dum nutrejojn vi kontrolas,
vi ridige drole rolas.

Ne lasis ni la koron en Parizo

Ne lasis ni la koron en Parizo,
ni savis ĝin per fuĝa far'.

Hejmvenis ni sen mono kun valizo,
kaj vivis tie ĝoje nun dum jar'.

Ne lasis ni la koron en Parizo.

Neniel mi sopiras pri Parizo!
Ne saltas mia sango do pro splen'
pri urbo de orgojlo, de monftizo,
pri la turistkaptilo apud *Seine*.

Jen rabatakoj estas la devizo.

Ridindas eĉ la arboj en Parizo,
kaj fian ombron ĵetas *Notre Dame*.

La ŝiptrafiko kaje pro la grizo
ne ĉarmas plu pro troa kostprogram'.

Plu lumas lampoj, sed dum daŭra krizo.

Nu, certe belas Moskvo kaj Kadizo,
Berlino, Buda, Romo kaj Vien',
ne tristas tro la urbo ĉe l' Tamizo.

Pariz' nur estas Circo kaj siren'.

Mi eĉ ne volus morti en Parizo.

Mi havus rimojn pliajn en provizo,
finiĝu tamen nun do la kompar'.
Postmorte nin atendos paradizo.
Ni iros al Nirvan' kompletaj – ĉar
ne lasis ni la koron en Parizo.

Rimarkoj

La teksto estas parodio pri la poemo „Parizo“ de Leonard Newell. Ĝi estas bone verkita, sed laŭ mia opinio tro malfrue ĉimaniere verkita. En la tempo, kiam Hemingway tie ankoraŭ sufiĉe bone vivis kiel usonano, Parizo eble vere estis ĉarma kaj afabla urbo, sed nun....?

Mi devas aldoni, ke mi fariĝis kun Donjo en Parizo efektive preskaŭ la viktimo de rabatako; ni povis savi nin nur per salto en hotellifon, en la lasta momento. Sed tio certe ne okazas al ĉiu, kiu vizitas Parizon. (Multaj pli bonŝancas, certe, sed kelkaj eĉ malpli ol ni.)

Ĉu oni ŝatas aŭ ne ŝatas urbon, dependas ankaŭ de tiaj hazardoj kaj mornaj cirkonstancoj, sed laŭtendence mi efektive pensas, ke Parizo, kiel en germanan frapŝlagro, estas granda muskaptilo. La prironĝataj musoj estas la turistoj. Kaj la

ŝarkoj estas... nu, tion vi ja scias mem kaj spertas ĉiutage kiel la resto de l' mondo.

Tamen kompreneble ankaŭ mi ŝatas certajn aferojn kaj aĵojn en Parizo. Speciale surstratajn Ĉaplinojn kaj la Ejjfelturon mi eĉ ŝategas. Tiu grandega proleta fera ulo, kiun la parizanoj komence tute ne volis havi, estas vera lumturo en maro de ĉiutaga turista tristo, kaj ĝi estas fama ekzemplo pri tio, ke el aĉa anaso povas fariĝi finfine bela cigno. Oni devas nur lasi iom da tempo al la laŭŝajna griza anaso.

Kaj kiu sciu, eble ankaŭ Parizo denove estos sprite bela kaj afabla kaj denove la urbo de tiaj filozofoj kiaj Sartre. Eventuale post cent jaroj, kaj tiam ĝi eble estos eĉ rava loko por la tie ne tre ŝatataj germanoj! Tio estus bona afero.

Mi persone ne ŝatas egurbojn, mi prefere vivus en arbaro en kabano laŭ Walden, sed ankaŭ tio estas iluzio. Certe. (cez)

Ne pretekstu poezio

I

La preteksta poezio,
gravas nur por glorkron-dio,
konfuzigas poezio
pri preteksta nula io.

II

Nebulvandoj de pretekstoj
helpas ne pri bonaj tekstoj.
Poezio nin konfuzas,
se tamtamo vante ruzas.

III

Se pavverkas konfuzulo,
ĝi ne helpas eĉ al pulo.
Se la poetin' nur lindas,
ŝiaj versoj ne legindas.

Se poeto grandan provas
kaj nur sterkon fine kovas,
ni kun rajto lin misfidas
kaj aplaŭdon nian bridas.

IV

Poezio estu multo,
sed neniam pura stulto,
kaj neniam falsa sento
en furzita brua vento.

V

Poezio veku sentojn,
foje ankaŭ akrajn dentojn,
sed neniam ĝi deliru
aŭ miasmojn nur elspiru.

VI

Poezio estu vera,
delikata kaj tenera;
kaj ĝi estu pli ol tio,
foje eĉ jubila krio.

VII

Poezio estu homa,
ekster si kaj eĉ endoma;
poezio estu ĉio,
kruda dir' kaj ĝojebrio.

IX

Ne pretekstu poezio,
ĉar sur ver' sin bazas ĉio;
flustru poezi' kun honto
kaj fanfaru sur la monto.

Ne ŝovu vian nazon...

Ne ŝovu vian nazon
en iun fremdan vazon,
respektu privatecon,
elektu ĉiam decon.

Se vi spionas homojn
kaj orelumas domojn,
vi estas sen respekto
pro kruda decneglekto.

Ne estu fi-scivola
eĉ tute libervola.
Do for de fremda vazo
per tro scivola nazo.

PS: Verkita laŭ proverbo de Zamenhof.

Nubofantazio

Jen nuboj sur la lago
kaj dum ĉiela vag'.
Ni tuj kun ĝoj' konstatas:
Jen kia bela tag'!

La nuboj supre flugas
kaj naĝas sur la lag'.
Ni pro feliĉ' ekrevas,
tuj flugas en imag'.

Ni estas kvazaŭ nuboj
en nia fantazi'.
Ni vidas nin surlage
kaj nubojn ĉirkaŭ ni!

Nuboj

Ni rigardis longe nubojn
kaj do perdis ĉiujn dubojn,
ke la vivo tamen belas,
se ni ion belan celas.

Ni rigardis nubkastelojn,
eĉ delfenojn, blankajn velojn.
Kaj interne ni jubilis,
ĉar la tago hele brilis.

Ni rigardis sur herbejo
en floranta elizeo.
Kuŝis mi kun mia kara,
bela horo senkompara.

***Rimarko:** Elizeo estas en la greka mitologio ejo por feliĉuloj,
do paradizo, sed jam transmonde.*

Nur gastoj surtere

Ja eble estas lasta foj',
ke mia man' sur via kuŝas,
ke mi, migranto sur la voj',
do viajn karajn lipojn tuŝas.

Vi ridas hele kaj kun ĝoj'
kaj tiom softe min karesas.
Sed mi, migranto sur la voj',
la timon mian nun konfesas.

Ni estas gastoj nur sur Ter',
eĉ, se ni kiom ajn feliĉas.
Pro Morto kaj pro Lucifer'
plej rava amo ja finiĝas.

Ne por eterne estas am',
finiĝos ĉiu kiel ĉio.
Kaj ĝuste tial, kara dam',
ni amu nin do kun pasio.

Ja eble estas lasta foj',
ke mia man' sur via kuŝas,
ke mi, migranto sur la voj',
do viajn karajn lipojn tuŝas.

Pacon ne nur je Kristnasko

Festa familio sidas
apud kristnaskarb' en rond',
kaj neniuj tie fridas,
kvankam fridas en la mond'.
Ekjubilas kun favor'
kantoĥor'!

Avo faras festprogramon
kun avino ĉe la flank'.
Ĉiuj sentas iel amon
kaj aplaŭdas eĉ kun dank'.
Jen jam frapas ĉe la pord'
nun kun fort'.

Nikolao mem envenas,
ruĝvestita por la fest',
parolante ĉiujn benas,
tre ŝvitante sub la vest':
„Pacan feston en konkord'
Mia vort'!“

Sed malgranda knab' sur loko
sin tretadas per pied',
siajn vortojn nur post voko
metas flustre kvazaŭ pet'.
Li demandas kun dolor'
post esplor':

„Kara Nikolao mia,
mankas al la vortoj klar'.
Pacon nur dum festo nia?
Kial ne dum tuta jar'?
Kial pacon, ho, sinjor',
nur dum hor'?“

Sankta Nikolao miras,
staras iom en silent',
ĝis li tre solene diras:
„Ho, ho jes, konsent'!.
Pacon ĉiam kun fervor',
knab' el or'!“

Papilia fantazio

Papilia fantazio
estas ĉie, kaj je ĉio,
se atentas vi pri tio,
ĉu Viene aŭ en Rio.

Se vi ĝin neniam vidas,
mi al vi ne vere fidas.
Al vi mankus grava eco
en la lud' de l' eterneco.

Rimarkoj

Mi verkis la poemon iam pro instigo de Ŭel Roĝa, kiu rimarkis, ke la ritmo de mia poemo „Voko de l' papilio“ kvazaŭ redonas la flirtadon de papilio. Mi ne konsciis pri tio, sed la papilio estas ankaŭ por mi simbolo pri beleco, kaj ankaŭ kolora mistero en la mistera eterneco. Eble la bela papilio ekzistas por ni por memori nin, ke krom morto, neceso kaj pereco ankaŭ alia grava afero ekzistas: belo.

Belo ne estas tute komprenebla, ĝi estas antaŭ ĉio sentebla. Kaj belo estas ligita al amo, kaj amo al vero. Belo, amo kaj

ankaŭ la vero estas en certa senco unu afero, oni ne povas disigi ilin sen perforti kaj detrui ilin. Henriko Heine sciis tion, kaj mi estas de mia juneco admiranto de la granda poeto Heine.

Papilioj kaj belo en ĉiu kazo ekzistis jam, kiam la homo surtere ankoraŭ ne ekzistis. Ie en la reto mi vidis foton kun orangutanga geo, ili rigardis kune rozon, kiun la „viro“ mantenis. Ambaŭ homsimioj kontente ridetis. Tio montras, ke ankaŭ tielnomataj hombestoj sentas belon, tio do ne estas nur homa afero, belo estas certe kosma fenomeno. Eksterterulo, kiu ne sentas belon, kaj kiu ne ekzemple cerbumas pri la simetrio en la naturo, estas por mi neimagebla. (cez)

Pensuloklubo pensas

La pensuloklubo pensas
en kunsido pri l' demand',
kiom longe eblis pensi
kun permes' plu en la land'.

La pensuloklub' cerbumas,
ĉu necesas plu la kap';
iu tiam finresumas,
ke en kap' ja mankas klap'.

Plenlune

Plenlune viviĝas
la nokto per lum'.
Fantomoj promenas.
Turmentas cerbum'.

La monstroj naskiĝas,
dormul' ĉe promen'.
La katoj surgrimpas
la domojn pro splen'.

Policisto nr-o 285

Sur lia kapo tronas pinto.
Ĝi estas kontraŭbata finto.
Surzone lia nombro brilas.
Ĝi pravas, ke li ne civilas.

La policist' supere fartas.
Kaj se necesas, li eĉ startas.
Suspektajn ulojn li kolumes
tuj kaptas kaj senpalpebrume.

Li kaptus ankaŭ vin plezure,
leĝoligita kvazaŭ ŝnure.
Kaj se vi lin ne vere ŝatas,
la ulo tute senkompatas.

Povra poeto

Povra estas mi, poeto,
sub kovrilo pro la frid',
sed mi pensas pri soneto,
pri la poezi' kun fid'.

Ĉar tre pluvas tra l' tegmento,
pendas super mi ombrel',
sed mi estas ne sen dento,
sciencema, fil' de bel'.

Interlipas mia plumo,
mi serenas sen suflor'.
Libroj lite, por cerbumo.
Sankte brulas mia kor'.

Povra estas mi, asketo,
kaj mi kuŝas sur matrac',
apud vando sen tapeto,
sed mi verkas kun aŭdac'.

Homoj stultaj laŭte ridas,
kiam tiaj vidas ĝin.
Ili nur pri mono fidas.

Tial kraças do sur min.
Povra estas mi, poeto,
sed cezar' de l' fantazi'.
Eê por domo aũ buĝeto
mi ne volus esti vi.

Rimarkoj

La poemo estas verkita por fama pentraĵo de Spitzweg, sed mi verkis ĝin kvazaŭ ankaŭ por mi mem. (cez)

Preskoboldo

Homo, skribu senerare,
ne tro hastu fuŝe-fare.
Se vi vian menson uzas,
la koboldo ne plu ruzas.

Por l' fiulo tio endas,
ke vi fuŝskribitan sendas,
tial uzas li fifortojn,
tordas, murdas ofte vortojn.

Homo, skribu do pli lante,
ne sencsene aŭ tro vante.
Se vi ĉiam nur pavvortus,
la Satano vin forportus!

Homoj, se vi iam vidas,
ke la preskoboldo ridas,
skribu tuj al la aŭtoro
pri eraroj sen vervforo!

„Fido per si mem ja bonas,
sed kontrolo eĉ pli spronas.“
Lenin verkis, ĝin, ruzulo,

kun rikano ĉe l' postulo.

PS: *Kontrolo legas ankaŭ kiel kont-rola kaj la prezkoĉboldo estas frato de la prezkoĉboldo. (cez)*

Printempo estas juna vir'

Printempo dormis sur herbej',
konfide! Konfide!

La najtingaloj vekis lin,
jubilas hele kaj sen fin'.

En rojoj sonas jam muzik'
por nia kara koramik',
rapide! Rapide!

Printempo iras tra la val'!

Konfide! Konfide!

Li vestis sin per bunta vest'
por danci en printempa fest'.

Li volas kun tulipoj danci
kaj en la balo plu bonŝanci,
rapide! Rapide!

Printempo frapas al la pord',
konfide! Konfide!

La vintro ŝtelas sin nun for.

Jam venis lia lasta hor'.

Postrestis de li nur la rust'.

Printempo premas nin al Brust',

rapide! Rapide!

Printempo kuras tra la dom',

konfide! Konfide!

Lin sekvas tuj la sunobril'

kaj ventokirl' kun laŭta tril'.

Li kuras haste tra l' ĝarden',

gajecon semas jen sen pen',

rapide, rapide.

Printempo iĝas mem infan',

konfide! Konfide!

Infane kuras kiel vent'.

Ha, kia bela hela sent'.

Printemp' tulipon fine trovas.

Mateno mem la fluton blovas,

rapide, rapide!

Printempo dancas tra la strat',

konfide! Konfide!

Salutas dolĉe lin odor'

kaj laŭte batas ĉiu kor'.

Printempo estas juna vir'

kaj ĉiam venu laŭ dezir',

rapide, rapide!

Revina

Revina volus mare veli,
la tutan mondon tiel celi,
sed car ŝi ne la monon havas,
ŝi hejme restas, reve ravas.

Se iam helpus al ŝi banko,
ŝi tuj forvelus kaj kun danko.
Ŝi lasus la amikon hejme,
lin adiaŭus senprobleme.

Ŝi globotrotus sen programoj,
kaj montrus sin en panoramoj.
Ŝin viroj sekvus kiel muŝoj,
sed ŝi elektus por ekkuŝoj.

Lastfine kantus ŝi en bando,
revenus eĉ al la hejmlando,
kaj tie ŝi koncertojn donus -
se la amik' ŝin ne malspronus.

Revina revas malgraŭ ĉio
pri juna dio for en Rio,
sed hejme ne tro aĉe estas,
kaj tial ŝi sengrumble restas.

Nu, hejme la amiko sidas,
kaj tiu ja Revinan bridas.
"Revina, mankus al vi sperto",
li diras laŭte kaj kun certo.

Revoluciulo Mort'

Mi estas deviga, nomata Mort'.
Mi estas ŝanĝulo kun granda fort'.
Mi estas justulo kaj ribelul' ,
mi faros vin samaj eĉ sen postul'.

Al vera liber' mi gvidas de l' Ter',
el ĉiu plago, el ĉiu mizer'.
Mi pacon alportos sen iluzi'.
La savo mi estos por ĉiu el vi.

Ruinsorĉo

Se floras la ruinokult',
okulto - kaj sopirostult',
se ravas la natur' dum horo
kaj arboj gapas kun fervoro,

se ĥoro kantas sur la tur'
pri am' kaj kavaliroj nur,
se inoj sur kanonoj ridas
kaj aciduloj rande sidas,

kaj tie estas eĉ gastej'
bier' kaj mia ina fe',
mi ĝuas tion, manĝas lante,
kaj pensas, ke mi estas Dante.

Se mia kara kun fier'
laŭ ŝia propra manier'
min plena de amem' rigardas,
kaj kandelingoj en ŝi ardas,

mi diras tuj kun pret' al ŝi:
„Ho, kara, kia harmoni'!
La mondo estu do ruino,

kaj vi por mi la burgfraŭlino!“

Ŝi ne komprenas: „Ĉu ruin’?!

Sed poste tamen kaptas ĝin:

„Se restos nur ruin’ ĉe l’ fino,
mi estu via burgedzino!“

Semajno de nelaboremulo

Tag' lundo estas aĉa tag',
ne tag' laŭ mia gusto.
Kaj mardo estas servotag',
do ne la tag' de l' justo.

Merkredo estas laŭ diet'
kaj jaŭd' eĉ pli malplaĉe.
Kaj, se ne estus la vendred',
mi malsaniĝus aĉe.

Sabate pigras mi ĝis manĝ'
por posta dormprofundo.
Kaj se alvenis la dimanĉ',
minacas jam tag' lundo.

Senfineco

Mi amas vin, ho senfinec',
volonte vi enombas.

Vi tre proksimas min kun dec',
neniam ion nombras.

Mi amas vin, ho senfinec',
vi tiel bele ridas.

Pro via kor' de eternec'
vi ĉiujn aĵojn fidas.

Etere sonas bela kant',
de vi, ho, belulino,
vi venas el libera land'
kaj mi el via sino.

Vi foje volas pro volupt',
ke stelomilo lumu.

Mi vere volus, ke ĉe nupt'
vi kise min brakumu.

Mi scias, ke ĝi estas rev',
ne estos nuptofesto.

La senfineco estas krev'
kaj ŝanĝoj ties vesto.

Songô en songô

En songô mi eksongîs,
ke songâs mi en val'.
Mi en la songôn plongîs
rokoken post la fal'.

La homoj tie dancis,
en park' dum karnaval'.
Ĉe damoj mi bonŝancis
gîs krakis pafa knal'.

Mi tuj en puton saltis
ensonĝe en la val'.
El lago mi forsaltis,
sed jam sub luna pal'.

Sed kiam mi min vidis,
mi ploris pro la ŝok'.
Mi, kiu songôjn fidis,
fariĝis nun ezok'.

Spuron mi pentras, mian propran

Baladeskas mia sent'
eĉ en malkontent',
mi trobadoro
sen popolo
plu kantas al vent'.

Ne necesus eĉ koment'.
Mi paŝas sen pent'.
Spuron mi pentras,
mian propran,
kun aŭ sen konsent'.

***PS:** —laŭ la ĉineska versformo 'Zuihuayin' (ebrio en la ombro de l' floroj) skemo: (7,5,545)x2 a,a,xxa*

Suno kun verdaj okuloj

(por foto de David Sn)

Kun la suno en la koro
pli agrablas ĉiu horo.
Eĉ acida hom' pli fidas,
se ardbрила suno ridas.

Se eĉ hom' laŭ sun' elkoras,
homon tian ni adoras.
Eĉ la trista ino Luno
brilas hele nur pro l' Suno.

Kaj se Sun' smeraldokulas,
ĝia koro verde brulas.
Jen ĝi plenas de espero
pri pacverda mond' sur Tero.

Urbomuzikistoj de Bremeno

laŭ fabelo de fratoj Grimm

Azeno kantas kun pasi',
la hund' sur ĝi: „Boj, boj!“
Sur l' hund' la kat' miaŭas: „Mi!“
Sur l' kat' kokkri' pro ĝoj'!

Refreno:

„A-i, a-i, miaŭ, boj, boj.“
Kok' krias: „kokerik!
Pli bona ol la mort' sur l' voj'
troviĝos kun la klik'.

***PS:** Kabe tradukis la fabelon: „La bremenaj muzikistoj“, ĝi troviĝas en la elektitaj fabeloj de Kabe. Tie troviĝas azendiro el la fabelo: „Iru prefere kun ni, ruĝa kresto; Bremenon, ion pli bonan ol la morton vi trovos ĉie; vi havas belan voĉon, arta estos nia kvaropa koncerto.“*

Vakaj seĝoj

Vakas hale ĉiu seĝ',
senparolas nun la leĝ'.
Sindikatoj post sieĝ'
malaperis kiel neĝ'.

Vi, mia certo

Vi vekigās plena de konfido,
gaje nur, kun hela rido.
Kvazaŭ vi Nirvane kuŝis
aŭ la paradizon tuŝis.

Mi ja certas, ke la rid' sen brido
ne forlasos vin pro fido.
Se ni Elizee kuŝos,
vi min plu ridete tuŝos.

Vi vekigos plena de konfido
paradize plu kun rido.
Se ni tra la kampoj iros,
via rid' min plu altiros.

Voko de l' papilio

Bela bunta papilio
vokis min sen vort' al si.

Kia viglo kaj pasio,
kia flugo kun graci'!

Min fascinis ĝia belo,
la gracila harmoni',
ĝia danco en la helo,
la flirtado ĉirkaŭ mi.

Perpleksigis min la vesto
de l' ensorĉa belulin'!
Vi, plej bela dam' de l' festo,
mi adoras, amas vin!

P R O Z P O E M O J D E C E Z A R

Aĉeti liberon

Alia ol nun

Cirkokomenco

Donkiĥoto en labirinto

Elirvojo

Familio Jokel

Fendo

Granda estas...

Kafejo „Centra“

Kapricaj koloroj

Kial mi estas poeto?

Konduti blue

La diablo

La songo

Legu ankaŭ poemojn

Libereco, frateco, egaleco

Mi celebras...

Mi, la azeno, kaj ŝi

Ordono ankoraŭ estas ordono

Paŭso por hejme

Paniko, paniko!

Patrolanda biero

Pluvpoemo

Principo espero

Reichsbahn-bluso

Satano

Se miaj vortoj kriĉas kiel dragiloj

Silento

Somera idilio

Spuroj en la sablo

Sur flugiloj de facila vento

Tie supre, jen lumas la steloj

Tombejaj anĝeloj

Utila imago

Vento, sablo kaj steloj

Aĉeti liberon

Bonvolu, unufoje liberon,
jam artplene enpakitan,
kiel eble plej malkaran
en poŝoformato,
sed kun elektra torĉo
kaj sanktula aŭreolo.

Ĝi ne dolorigu
kaj ne faru problemojn
al mi, se mi havas ĝin.
Krome ĝi ne kontraŭdiru ion.

Ĝi ne tranĉu en la fingrojn
de la pugno en mia pantalonpoŝo kaj
mi devas havi la rajton redoni ĝin,
se ĝi ne plu plaĉas al mi.

Bonvolu do, unufoje libereton
je kreditkarto,
aŭ prefere eĉ
partopage.

Dankon,
sinjoro vendisto,
mi tre ĝojas.
Ĉe vi efektive ĉio
aĉeteblas.

Alie ol nun

Mi venas el tempo,
en kiu ni ankoraŭ sentis,
ke ĉio povus esti alia,
se ni nur vere volus atingi tion.
Kiel eskadro de Ikaroj ni refalis
el fiaskiĝinta socio
en la historie antaŭan,
en kiu perdiĝis
eĉ tiu sento.

Sur la ruinoj
de homafablaj utopioj
ni falas pli kaj pli
kaj miras pri tio,
kiom profunden
homoj povas fali
antaŭ ol ili denove
komencos konsideri,
ke ĉio povus esti alia,
se ili vere volus atingi tion.

Cirkokomenco

Tion ni spertis ĉiuj:

La cirko estas veninta!

Jam staras la grandega tendo,

ekbrilas ĉie la lumĉenoj,

kaj sur la pinto de la tendo

lumas alloge la nomo de la cirko.

Post la balustrado oni aŭdas jam

la trumpetadon de elefanto,

el karavano de la cirkartistoj

elsonas sentimentala buŝharmoniko.

Ni jam staras en la vicoj kaj

ŝovas kaj puŝas nin antaŭen.

Tiam ni sidiĝas inter la stangoj kaj mastoj,

tiel, ke ni bone povas vidi ĉion,

ĉar la cirko estas la plej bela

el ĉiuj vidoludoj.

La atmosfero estas ekscitiga.

La orkestro elprovas iun viglan

latinan ritmon kaj de la maneĝo

eliras la tipa cirkodoro.

Ni nun fariĝas dum momento

eĉ iom sentimentala, kiel la poeto Rilke:

„Kiuj do estas tiuj pretervagantoj,
kiuj eble ankoraŭ iom pli fuĝemas
ol ni mem?“

Sed tiam la prezentado jam komenciĝas.

Donkiĥoto en labirinto

Donkiĥoto

volas havi glason da mosto

ekscitiĝo

stampovizaĝoj

studado de leĝoj

looooooongedaŭra foliumaaaaaaaado

tik-tak-ado de horloĝoj laŭ helika tempo

laŭta minacanta nombrado

de la kavaliĉero de la Mancha:

9

8

7

6

5

4

3

2

1

0,5 ...

Li mallevas la lancon, rapidega forpreno de la lanco

SOS-VOKOJ

ĉefvizaĝoj

viroj kiuj portas la mondon kiel globon sub la brako

post ili iliaj papagoj

kaj iliaj marionetaj pupetoj

kun rabobirdaj vizaĝoj

Donkiĥoto estas tre soifa

kolera ŝŝŝŝ-----oooooooooovado de skrib----krkkkkk----tabloj

notado de la okazaĵoj sur notfolion.

fermado de la sekcio por disipo

oficejo 3

oficejo 2

oficejo 1

transpreno

de la identigilo

fare de la tre nekontenta Donkiĥoto

ĉe la orumita elirejo

de la

labi

rin

to

admona rigardo

kaj minaca aludo
ke oni povus trakti ankaŭ alie la ...
fermado de la labirinto
kun
samtempa
elpuŝado de Donkiĥoto de la Mancha
el la
sanktaj haloj...

Finon
kaj punkton!

***Rimarko:** Mi verkis la poemon en la glasnost-tempo, pro tio la
glaso da mosto, kiun postulas Donkiĥoto. Oni ja ne ĉiam tuj
devas laŭte elkrii tion, kion oni celas, ĉu ne? Sed kelkfoje,
speciale dum ribeloj kaj revolucioj necesas, kiam jam temas
pri la forbalado de reakcia regantaro.*

Elirvojo

Mi , kiu perdis la vojon,
ne plu scias,
kiun vojon mi iru.

Mi iras, sed mi jam ne scias,
kial mi iras plu sur tiu vojo.

Mi iras, sed mi ne plu scias,
kien?

Mi iras,
sed mi perdis jam la esperon,
ke tiu vojo kondukos min al celo.

Mi iras plu, sur tiu
jam tro ofte uzita vojo.

Mi iras, sed mi ja jam scias,
ke ankaŭ tiu vojo,
kiu iam estis mia celo,
ne kondukos min al celo.

Mi iras plu,
tute mekanike,
pro certa malkuraĝeco,
sed mi nun cerbumas obstine pri tio,
kiun vojon mi efektive iru.

Mi iras plu,
sed mi trovos
kiel ĉiam –
nur novan elirvojon.

Familio Jokel

La edzo elsendas la edzinon,
ke ŝi alportu botelon da brando.
La edzino ne alportas la brandon
kaj ankaŭ ne venas hejmen.

Jen la edzo elsendas la filinon,
ke ŝi tradraŝu la patrinon.
La filino ne tradraŝas la patrinon,
la patrino ne alportas la brandon
kaj ankaŭ ne venas hejmen.

Jen la edzo elsendas la hundon Cezar,
ke ĝi mordu la filinon.
La hundo ne mordas la filinon,
la filino ne tradraŝas la patrinon,
la patrino ne alportas la brandon
kaj ankaŭ ne venas hejmen.

Jen la edzo elsendas la revolveron,
por ke ĝi pafu sur la hundon.
La revolvero ne pafas sur la hundon,
la hundo ne mordas la filinon,
la filino ne tradraŝas la patrinon,

la patrino ne alportas la brandon
kaj ankaŭ ne venas hejmen.

Jen la edzo nun mem elpaŝas
kaj finas nun la ridindan komedion.
La revolvero nun pafas sur la hundon,
la hundo nun mordas la filinon,
la filino nun tradraŝas la patrinon,
la patrino nun alportas la brandon
kaj nun ankaŭ tuj venas hejmen.

Fendo

(por Francisko en Benino kaj por ĉiuj)

Iras fendo tra la mondo,
ĝi iras tra ĉiu kontinento;
tra ĉiu lando;
tra ĉiu homo kaj
ĉiu koro.

La homaro estas
desperige disŝirita.

Kial?
Kiom longe ankoraŭ?

Granda estas...

Granda ne estas perforto,
sed zorgemo, solidareco
kaj amo.

Ne la armitaj detruantoj
estas grandaj,
kiuj ĵetas bombojn
el sekura distanco
sur sendefendulojn.

Granda estas
la brava soldato Ŝvejk,
kiu kun sia rezista humuro
senarmigas armeojn.

Granda estas, se la kanonoj en muzeoj
pace ronkas en eterna dormo.

Grandaj estas
la konstruantoj,
la kreantoj
kaj tiuj,
kiu konservas

konservindan.

Grandaj estas
la silentaj ondantaj
tritikokampoj,
el kiuj fariĝos
pano.

Granda estas la rideto de homo,
se li sentas sin amata.

Granda estas la silento,
kiu ne estas perfido,
sed jesigo de la komuneco,
kiu ne bezonas multajn vortojn.

Granda estas,
se la aferoj kaj aĵoj
moviĝas kvazaŭ per si mem.

Grandaj estas sapvezikoj,
kiuj respegulas la mondon,
nuboŝafoj en blua ĉielo
aŭ mesaĝoboteloj tute solaj
en granda maro.

Granda estas,
se ĉe la starigo de neĝoviro,
pro pura ĝojo neniuj pensas pri tio,
ĉu la neĝoviro utilas,
ĉar ĝi baldaŭ disfluos,
se varmiĝos.

Granda estas tio, kio estas
preskaŭ nerimarkebla,
kvankam ĝi tenas
la mondon en balanco.

Kafejo „Centra“

(en Altenburgo/GDR)

Venu sur la verdan herbejon,
en la ruĝan muelilon,
blua knabo
kun la ruĝa perlo
en la orelo.
Buĉu la oran kokinon!
Ĝuu la sekton
de la marko Tropik'!

Kapricaj koloroj

El la ruĝo, kiun mi hatis pli kaj pli,
mi explore vojaĝis en la nigron.

La nigro senpene estingis la ruĝon
kaj tiel havigis al mi ŝajnan kontentigon,
ĝis ĝi fine – kiel la ruĝo – fariĝis kateno.
Nigro, kiu komencas gorĝopremi homon,
oni povas bridi nur per grandioza lazuro,
kaj tiel mi ekamis la lazuron de la ĉielo.

Sed ĉar la lazuro por mi estas la koloro de la paradizo,
mi ne longe eltenis la bluan kaj sopiris
la ekscitigajn kolorojn flavo kaj oranĝo,
kiuj povus aĉeti min el la sennubeco de la ĉiela bluo.

Mi furiozis en flavo kaj oranĝo kun la kreanta impeto de
giganto, sed aĥ, la flavo kaj la oranĝo subite fariĝis ruĝaj,
kaj la ruĝo kriis kiel krias perditaj animoj,
kaj nigriĝis antaŭ miaj okuloj kaj mi sopiris ree
la lazuron de la ĉielo.

La ĉielo fariĝis blua, kaj ĉio, kio estis
je turmento kaj doloro kaj malamo en mi,

retiriĝis en la bluan horizonton,
kie la nigraj sentoj fine tute perdiĝis.

Kaj tiam mi vidis la bluan floron,
kaj mi kuris al la blua floro,
sed kiam mi atingis ĝin, ĝi jam ne estis blua.

La suno estis subiranta en flavo kaj oranĝo.
Kaj mi volis firmiteni min en tiuj flavo kaj oranĝo,
sed la suno fariĝis pli kaj pli ruĝa,
kaj la nigra nokto falis sur min.

Kaj mi, kiu ne povas elteni ĝin
dum longa tempo en nur unu koloro,
jam sopiregis la bluan
de la sekvanta tago.

Kial mi estas poeto?

Ĉar mi volas paŝi
de mi al la mondo,
kaj de ĝi al vi,
ĝis mi fine
alvenos ĉe ni
kaj denove ĉe mi.

Poeto estas tiu,
kiu brakumas la mondon.

Konduti blue

Simple konduti blue.
Hodiaŭ konduti blue
kaj morgaŭ konduti blue
kaj postmorgaŭ eventuale blusblue.

Pluki la bluan floron.
Je la blua horo meti ĝin
postorelen kaj lasi flui la Bluan Maron
en la bankuvon
sur la bluajn ĵinzojn,
kiuj ankoraŭ ne estas uzitaj.

Trinketi volupte „Delton de Venuso“
kun blua kuracao, ginsenglikvoro,
blanka rumo kaj dolĉa kremo.
Pro ĝi bluiĝi.

Tra la malfermita fenestro
rigardi la bluan ĉielon.
Kaj jen ĝi jam flugas,
la unua hirundo
el papero tra
la blua banĉambro.

De kie venas vi?
El Turkio aŭ el Ŝlaraflando?
Kion vi jam celas ĉi tie?
Tiajn frenezajn ideojn
havas kutime nur mi.

Sed mi estas sufiĉe blu-ebria,
kuŝas en la blueta bankuvo kaj
meditas pri karpoj bluaj,
pri la reĝinoj de bluaj noktoj,
pri mortaj bluaj lipoj kaj
la bluecajn fruntsulkojn de
uletoj.

Tial mi malaperas rapide
en bluan orientan sonĝon
kaj atendas, ke bluema revohomo
eksentu mian mankon.

La diablo

Li estas unu el la kompatindaj figuroj,
kiuj delonge mortis, kaj kiuj tamen
devas vivi plu, ĉar oni forgesis
entombigi ilin.

Jam en la fabeloj li estas tiu,
kiu ne gajnas la ludon.
Kun vosto kaj ĉevalhufo
li triviĝis, fariĝis ŝercfiguro,
simpla ridindulo.

Enua li estas kiel Dio
kaj tiel nedanĝera kiel
la ebruloj en la tavernoj,
kiuj pro frustracio reciproke
draŝas seĝojn kaj bierbotelojn
sur la kapojn.

Kiel Mefisto li ne plu estas akceptebla,
ĉar li fariĝis multe tro spirita.
Kaj kiel inferhejtisto sur la Mortula Ŝipo
li estas diletanto, ĉar li havas
tro multe da kulturo.

Rigide ekstermoda estas
la maljuna sinjoro Volant,
kaj tial delonge alternigita de multe pli
senskrupulaj mastroj de l' hororo,
kiuj transprenis la negocon de l' veterano.

La sonĝo

Mi havis la sonĝon,
ke mi staras antaŭ tribunalo kaj,
ke ili demandas min:
„Ĉu vi vere supozis,
ke la iometo da amo,
kiun havis vi, povus sufiĉi
por savi la mondon?“
„Ne“, mi respondis en tiu sonĝo,
„tion mi certe ne supozis,
sed mi tamen provis ĝin.“

Legu ankaŭ poemojn

Vi rapidas, vi hastas. Vi kuras.
Vi faras tion, kion ĉiuj faras?
Kial vi ne legas poemojn?

Forĵetu vian brakhorloĝon.
La poemoj pacience atendas vin,
kelkaj jam dum longa tempo.

Poemoj estas aliaj momentoj.
Poemoj estas bluaj fenestroj
en grizaj pluvemaj tagoj.

Poemoj estas eĥosondiloj
aŭ savringoj por dronantoj.
Poemoj estas buoj kaj turoj.

Poemoj estas miraklokestoj.
Formetu la poemskalpelon
el viaj lernejoj tagoj.

Poemoj ne estas soldatoj,
Legu ilin foje ankaŭ laŭte.
Flustru ilin, deklamu ilin explore.

Se vi legas poemojn, faru tiel,
kvazaŭ vi sidus en koncerto
de ĉambromuzikistoj.

Legu do poemojn,
forlasu vian maŭzoleon.
Fajfu pri la tielnomata utileco
kaj legu poemojn!

Legu bonajn poemojn, leganto,
sed ne forgesu ĉe tio vin mem.
Legu ankaŭ poemojn.

Libereco, egaleco, frateco

LIBERECON jes ja,
sed ĝi devas esti stampita antaŭe.
Liberon, ĉu? Jes ja! Sed ne sen iuj limigoj!
Ankaŭ la libero devas havi limojn.
Tiom liberaj ni ankoraŭ tute ne estas,
ke ni povus elteni la liberecon de ĉiuj aliaj.

EGALECON jes ja, sed ne
en la senco de sama posedo!
Egalecon, ĉu? Kial ne?
Sed ne tute sen limigo!
Ankaŭ la egaleco devas havi limojn.
Ĉar ni ankoraŭ tute ne tiom progresis,
ke ni povus elteni la egalecon de ĉiuj.

FRATECON, jes ja,
sed ne por ĉiuj.
Fratecon? Kial ne?
Sed ne sen limigo!
Ankaŭ la frateco havas limojn,
ĉar tiom ni ankoraŭ ne progresis,
ke ni povus tute elkore deziri

ankaŭ la fratinecon.

Mi celebras...

la disŝiradon de amletero,
jubile aplaŭdata de pego,
matene frue je la oka
en la urba arbaro.
Ĉiu korbato
memorigu min,
kiom mi amis vin.
Pluvogutoj falas
kiel ploroj sur la tombon
de miaj esperoj.
En la abismoj de mia timo
vi kuras kiel infano
kun groteska harplektaĵeto
kaj vokas: „Halo, halo, karulo!
Mi ne volis mortigi vin!
Nur endormigi.
Mi vere tre bedaŭras tion.
Pardonu al mi,
karulo.“

Mi, la azeno, kaj ŝi

Ŝi, la poetino

Vi rajtas min demandi ĉiam,
egale, pri kio temas,
vi estas kiel frato.

Mi eltenos ankaŭ
vian kritikon,
kaj aŭskultos vin.

Mi volas esti
kvazaŭ fratino por vi.

Demandu min,
mi helpos al vi plori
ĉe la brusto de via edzino.

Sed lasu min esti mano via ,
se vi bezonas min.

Mi ne estas infano,
Mi estas via ombro,
kiu staras malantaŭ vi.

Mi estas via spegulbildo,
parolu kun mi.

Mi konsolos vin kaj ŝin.
Vortoj povas ensorcigi,
tuŝi ĝisploro kaj ridigi vin.

Aŭ ĵeti en desperon.
Ni agu atenteme,

ni, la vortmetistoj.
Mi admiras vin.
Vi trovis bonan vojon.
Tio estas permesata,
ke mi apogas mian kapon
al via ŝultro kaj vidas vin
verkanta, kaj tio,
kion vi skribas,
albordiĝos
en mia koro.
Vi atingis,
ke miaj tagoj
estas buntaj.
Mi mallaŭte dankas al vi.
Kaj al ŝi por la rideto
kaj por la koloroj...,
kiel fratino via.

Mi, la azeno

Nur unu demando, kara.
Viaj vortoj estus kiel balzamo
sur mia suferinta animo,
kial mi do ne plu aŭdis ion de vi
dum nun jam ses aŭ eĉ pli da jaroj?
Kvankam vi eldonis eĉ ampoemojn
kun alia en tiu tempo?

Ĉu tial, ĉar eterneco estas ĉeokaze
tre efemera? Ĉu pro la alia aŭ
pro io tute alia?
Tion mi volonte volus foje ekscii.
Tamen mi komprenas vin, tute certe.
Vi ne devas respondi al mi.
Mi estas granda azeno,
ĉar mi demandas vin.

Ordono estas ankoraŭ ordono

„Vi vivas damne bone, ĉu?“

„Pravas, MI vivas bone, jes.“

„Vi voras manĝon, ĝis vi krevas, ĉu?“

„Kial ne?“

„Vi voras vian salajron.“

„Bedaŭrinde jes.“

„Vi vorus vin mem?“

„Se foje ne alie eblus.“

„Vi ne amas viajn najbarojn.“

„Mi ne estas kristano.“

„Solidareco estas por vi merdo, ĉu?“

„Kompreneble!“

„Kaj tiuj, kiuj venos post vi?“

„Dio mia! Tion vi MIN demandas?!“

„Kaj socia justeco, ĉu?“

„Kio tio estas, nova truko de la ruĝuloj?“

„Kaj, ke vi vivas nur unufoje, kiel homo aŭ kiel bestaĉo?“

„Tio estas afero mia, notu tion, flavbekulo!“

„Ĉu vi suicidus?“

„Neniam!“

„Ĉu vi murdus iun?!“

„Dependas de la situacio.“

„Kiel soldato?“

„Nun vere leku min, ordono estas ankoraŭ ordono!“

Rimarko: *Tiun prozpoemon mi verkis, kiam mi estis ankoraŭ ne esperantisto, do antaŭ tre longa tempo, kiam mi estis fakte ankoraŭ junulo. Sed mi pensas, ke la poemo plu estas aktuala ; homoj, kiuj fidis pri nenio plu kaj kiuj akceptas ĉiun krimon sen kontraŭagi, eble ankoraŭ nun estas la granda silenta plimulto.*

Pafbudo por hejme

*(poemo por la militindustrio
kaj ties glorigantoj)*

Unue ĉiujn anasojn,
tiam paperflorojn
kaj cel-telerojn!

Kaj poste
ankaŭ homojn!
Unue la geavojn!

Poste la gepatrojn.
Tiam la instruistino en la gimnazio,
tiu cerbmalsana stultulino,
kaj poste iu en rulseĝo!

Kaj kiam ĉiuj jam kuŝos en sango,
ili ĉiuj ricevos kiel dankon
grandan pluŝurson
de la fama firmao „Ĉiampreta & filoj“,
kiu ne povus ellasi tiun negocon --
pro la agresema konkurencio el Ĉinio.

Paniko, paniko!

Estis jam malfrue.
Subite domo tordiĝas.
K., kiu ne volis kompreni tion,
rigardas el la fenestro.

Nigraj arboj disrompiĝas.
Ino kriĉas.
Aŭtoj saltas antaŭen.
Ĉiuj kuras rapide
al la savelirejo.

Sinjoro K., en la mezo,
embarasita.
Paniko kaptas lin.
Amasoj lin timigas.
Nur for, nur for de ĉi tie!

Avertlampoj signalas histerion.
Sireno ekhurlas:
Ŝtormvento.

Kie estas la savelirejo?!
Kie estas la savelirejo?!

Savelirejo? Damne! Tio
ja ne estas savelirejo!

Ŝovado. Puŝado.

Fine ekstere.

Infanplorado.

Ekpluvas,

subite kaj draste.

Plakatoj m o l i ĝ a s.

Afiŝkolonoj s i n k a s.

Ĉiuj esperoj entombigitaj.

Sinjoro K., kiu neniam fidis pri si,

pensas ankoraŭ:

Vi, kiu vi neniam estos.

Ombroj, ombroj.

Paŝoj, paŝoj.

Neonlumoj. Hupado.

Sanitaraŭto, fajrobrigado.

Frida negocfervora

ordigado kaj fermado

de la vicoj.

Tro malfrue, tro malfrue.

Tio ja ne estis

savelirejo!

Sinjoro K. kuras ankoraŭ plu.

Sinjoro K., kiu neniam rajtis esti.

Sinjoro K. , kiu devojiĝis.

Sinjoro K., kiu tuj malaperos.

Patrolanda biero

(bonvolu legu tion kiel ironion)

La plej bona biero estas el Ĉeĥio.

La plej bona biero estas el Germanio.

La plej bona biero estas el Svedio.

La plej bona biero estas el (bonvolu enmeti vian patrolandon.)

La plej bona biero do estas la patrolanda.

Kiu ne akceptas tion, tiu estu trempita en patrolandan bierbarelon ĝis li estos trinkinta tiom da biero de sia patrolando, ke ankaŭ li konsentos, ke la plej bona biero estas el la patrolando.

Kaj se iu tamen plu asertos, ke eksterlanda biero estas pli bona, oni sendu lin per usona defendoraketo al la luno, sen reveturbileto, por ke li povu tie trankvile pripensi, kiu biero estas la plej bona en nia patrolanda mondo.

Pluvpoemo

Pluvas kaj pluvas kaj pluvas,
sed mi iras kaj iras kaj iras
kaj ignoras kaj ignoras kaj ignoras,
ke pluvas kaj pluvas kaj pluvas.

Principo espero

Vivu sur tiu buĉfabrika planedo
kiel esperanto en kancerkliniko.

Lernu estimi vin mem,
eĉ, se vi estas nur la celtabulhomo
en aĉa Miĉjomusofilmo.

Karesu, kiam oni diras al vi,
ke vi malamu.

Rezistu per via tuta energio
kaj per via tuta fantazio
la detruon de via animo.

*PS: Mi verkis la prozpoemon, kiam mi ankoraŭ estis junulo,
kelkajn jarojn poste mi tradukis la prozpoemon en Esperanton.
(cez)*

Reichsbahn-bluso

(Antaŭ mia elmigro en la jaro 1988)

He, vi, juna viro
kun la buŝharmoniko
inter la dentoj,
sur la lasta perono,
kun ĉiuj ĉi solecaj homoj
ĉirkaŭ ni,
ludu la *Reichsbahn*-bluson
de Stefan Diestelmann por mi,
ludu pri la tristaj stacidomoj,
nun, minuton antaŭ noktomezo,
antaŭ ol la ekspretraĵno enveturos en la landon
de necerta futuro.

Ludu por mi la bluson
pri la transportoj en la gason,
tiam, kiam mia patro
laŭ onidiroj estis skribisto
en koncentrejo.

Ludu por mi la kanton pri la „bruttransportoj“ en la
gulagon.

Ludu la kanton pri la silentaj homoj,
kiuj tiam silentis, kaj kiuj nun denove
silente sidas kun rigidaj vizaĝoj sur siaj kofroj.
Ludu al mi pri la fantomecaj neonlumoj,
kiuj falas sur la neĝon antaŭ la stacidoma halo.

Ludu por mi la kanton pri la feraj pontoj,
imitu al mi la vaporantajn pumpumantajn trajnojn,
kiuj alvenis neniam.

Ludu pri la veturgastoj de la fervojoj,
kiuj silentas kaj atendas kaj rigardas eksteren
sur la preterflugantajn bildojn de l' nokto:
sur la mornajn arbojn, la grizajn herbojn,
sur la nigron post la vitrotabuloj,
sur gigantajn dragilojn kaj kamentubojn,
sur la lumĉenojn de la urboj.

Ludu por mi pri la malmultaj rezistemaj lumoj,
kiuj eklumas dum sekundoj en la tenebro.

He, vi, juna viro,
kun la buŝharmoniko inter la dentoj,
ludu por mi la *Reichsbahn*-bluson,
antaŭ ol komenciĝos mia veturo de la oriento

al la okcidento de Germanio.

Ludu al mi la *Reichsbahn*-bluson,
por ke mi ne restadu plu sola
kun mia malgajo,
post kvarjara atendotempo
pri la elmigrada permeso.

Rimarkoj

Reichsbahn = regnofervojo

'Reichsbahn', pri tiu absurda nomo jam sub Hitler uzata kaj poste plu en GDR, mi ĉiam miris, kial la nomo en GDR plu estis uzata, kvankam ĝi laŭnome estis demokrata respubliko.

Stefan Diestelmann – elstara blusmuzikisto de GDR

Satano

Estis tempo, en kiu mi supozis,
ke Satano estas nur alia vorto
por la diablo. Mi opiniis,
ke la diablo fiaskiĝis,
ke la diablo ne plu meritas atenton.

Kiam mi komencis konscie
pentri subkonsciajn bildojn,
mi lernis rapide, ke Satano
ankoraŭ tute ne atingis la finon
de sia historio.

Satano estas en ni mem,
Satano estas nia tute propra produkto,
kiu ĉiam ĝuste tiam frapas nian pardonon,
kiam ni ne petas pri tio.

La infero, tio estas ni mem.
La infero estas nur la fantastika rebrilo
de la mornaj pejzaĝoj ĉirkaŭ ni kaj en ni mem,
kiujn ni tial timas kaj devas forŝovi.

Rimarko: *Mi sukcesis kiel vojaĝanto pri stranga foto en la germana montaro Harco, sub memorŝtona plato de Goeto, borde de la rivereto Ilse. Tie mi fotis rokan bildon, kiu similas Mefiston. Tio instigis min al tiu prozpoemo.*

Se miaj vortoj kriĉas kiel dragiloj

Se miaj vortoj kriĉas kiel dragiloj
kaj miaj frazoj tamburas kiel ŝtanciloj,
ĉu mi tiukaze estas tro laŭta?

Se miaj dozro-hat-tiradoj
frakasas krake vilaojn,
ĉu mi tiukaze estas tro laŭta?

Se mia voĉo volus supersoni
la trumpetojn de Jeriĥo,
ĉu mi ankaŭ tiukaze estas ankoraŭ tro laŭta?

Se mi krias pro tiom da maljusteco,
ĉu mi tiukaze vere estas tro laŭta?

Se la muroj de l' mondo
de mia voĉo ekhavas fendojn,
ĉu mi tiukaze estas tro laŭta?
Ĉu mi tiukaze estas laŭta?
Vere laŭta?!

Aŭ tamen ne sufiĉe laŭta?
Aŭ multe tro mallaŭta?

Sed unue foje envenu al mi,
ĉe mi vi rajtas krei.

Silento

Vi estis aliaj
ol ĉiuj aliaj.
Vi ne estis malicaj
kiel la plej multaj.

Sed nun vi faras ĝin tiel,
kiel la aliaj.
Vi estingas kaj
mortsilentas tion,
kion vi supozas
ne povi elteni.

La tago nulo venis.

Kio restas al mi,
tio estas via silento,
mia teruriĝo
kaj tiu ĉi sperto.

Somera idilio

La suno estas varmega,
sed ne tro.

Du knaboj metis lignan tablon
el la mebloj de avinjo
en la ĝardenon antaŭ la domo,
sur la herbejon,
ĉe la ombrorando
de la granda nuksarbo.

Nun ili ludas kartojn
ĉe tiu kvarangula tablo.

Ili sidas kontente
en kurtaj ledopantalonoj
kaj kvadratitaj ĉemizoj.
La vakeraĵajn ĉapelojn
ili leĝere ŝovis postkapen.

Nigra kato atentas,
ke neniu trompludu.
La limonadoglasoj de la knaboj
brilas kiel diamantoj,

kaj en la blua ĉielo
promenas nubofamilioj.

Ĉiuj formikoj,
kiuj perdis la vojon,
povas ankoraŭfoje
savi sian vivon,
ĉar aŭtentika vakero
ne murdas senkulpajn formikojn.

El la kasedomagnetofono
perlas gajaj notoj:
I came from Alabama
with my banjo on my knee ...

majo 1988

Spuroj en la sablo

(verkita por sireno de l' amo)

Mi serĉis ŝin vespere ĉe la maro
proksime de ŝia domo,
ĉar mi scias, ke ŝi ŝatas kuri
nudapiede sursable,
kiam la vento petole blovas
kaj la ondoj kiel
teneraj langoj
volupte tuŝas la strandon.

De ŝia domo estas nur kilometro
ĝis la maro.
Sed mi ne trovis ŝin.
La strando estis malplena.
Eĉ ne mevo videblis.
Iu desegnis per la piedo
grandan inan okulon en la sablon,
belan okulon, la okulon de diino.
Ĉu estis ŝi, kiun mi
dum mia tuta vivo serĉis?
Kiu pentris la okulon per bastono?

Mi iris plu sur la sablo
kaj trovis en la sablo
simplan desegnaĵon
de koro, krude trapikita de forta sago.
Bildon, kiun ŝi iam sendis al mi.

Frenezulino, mokulino, tion VI desegnis!!!

Kion vi faras kun mi?

Kial vi forlogas min?

SIRENO DE L' AMO,

kial vi tiom turmentas min?

Pripensu, ke mi perdis la kapon pro vi.

PRO VI.

PRO VI.

NUR PRO VI.

Mi iris plu sur la sablo

kaj mi trovis

la infanecan vizaĝon

de mokema lunino.

Kio tio estas?

Kiu volas forlogi min?

Homo aŭ diino?

Kiu vi estas?

Kiu vin sendis?

Ĉu vi celas min?

Min???

Diru!!!

Kiun vi volas forlogi?

Karulino!

Diru fine!

SIRENO DE L' AMO!

FRENEZULINO!

Kiun vi vokas per viaj
poeziaĵoj al vi?

Mi iris plu sur la sablo,
kaj nun mi trovis la spuron
de malgrandaj delikataj piedoj,
kiujn la multnombraj ondoj
per siaj avidaj langoj
volupte prilekis.

Ĉu estis viaj piedoj?

Ĉu tiuj de alia diino?

Mi sekvis kurante la spurojn
en la sablo kaj laŭte kriis
kiel la kantisto Orfeo
al la maro:
Vi Dioj, diru al mi,
kien tiu spuro kondukos?
Al la lando NENIAMAJNO?
Belulino, neniam mi vidas vin.
Neniam mi povas kapti vin.
Ĉiam vi kuras for de mi
antaŭ ol mi povas atingi vin.

FRENEZULINO,
KARNAVALINO,
SIRENO DE L' AMO,
MONTRU VIN!

Mi iris plu sur la sablo.
Ŝtormo leviĝis.
La dio de l' vento ekkoleris
pri miaj stultaj demandoj.

Sed la spuroj de la sireno
en la flava sablo

iom post iom
forviŝigis.

Sur flugiloj de facila vento

En la mondon venis nova sento,
tra la mondo iras forta voko;
Per flugiloj de facila vento
nun de loko flugu ĝi al loko.

Kiam ni sur la flugiloj
de facila vento
subite ekflugis,
de loko al loko,
ni ektimis,
ni ne tre certis,
ke ni transvivus
tiun flugon sen
problemoj.

Sireno ululis, jen la forta voko!
Sed kiam ĉiuj kamaradoj
en la nokto ekronkis
ĉe la granda turo,
ni sinkis kiel lanugoj teren.
Eĉ paraŝutoj ne necesis,
kaj tamen ni sekure surteriĝis.

Kie? Ĉe la turo de Babilono!

Tie multaj homoj
per diversaj langoj kaj lingvoj
ĝoje salutis nin.

Ni estis ree hejme,
inter ni.

La alta flugo
estis finita.

La posta lingvoinsulo
malproksimis mil mejlojn for de ni.
Nia malgranda ronda familio,
la diligenta kolegaro de la aventuro,
kaj eĉ tiuj, kiuj ne kunflugis,
hisis la krokodilan flagon
kaj ni festis feston tian,
kian ni festis ĝin
jam dum jarcentoj.

Ĉu ni ankoraŭfoje ekflugos?

Mi ne scias.

Sed oni ja neniam diru, ke ne...

Tio alportus malfeliçon, çu ne?
Se la mondo subite șanđiđus,
ni certe ne volus postresti.

Tie supre, jen lumas la steloj

Viaj tielnomataj amikoj,
(se vi ankoraŭ havas iujn),
aŭ via geedza partnero,
(se vi ne estas jam eksedziĝinta),
aŭ la kanario,
(se ĝi ankoraŭ ne forflugis),
rakontas al vi sen kompatato
ĉiam denove la samajn aferojn.

Vi pensas, ke vi jam delonge estas morta,
neniu sento, por nenio plu.
Ĉio estas ŝajne pli malproksima de vi
ol iuj foraj galaksioj.

Vi volas legi ion, sed la linioj
fordrivas el viaj okuloj.
Vi volas surskribi ion,
sed vi demandas vin tuj:
Kial? Pro kio? Por kiu?

Estas kiel falo en abismon.
Vi ne plu moviĝas,
vi sidas kiel katenito,

viaj piedfingraj ungoj kvazaŭ kreskas
en la tablon.

Ĉiu rezisto kontraŭ tiu sento
estas ŝajne sen senco.

La Tria Mondmilito povus komenciĝi,
estus egale al vi.

Sed tiam vi tamen pene leviĝas,
surmetas mantelon kaj iras
en la fridan nokton.

Tie supre, jen lumas la steloj
kaj vi lasas pendi la kapon
kaj trotas apatie antaŭen
tra la fantomeca urbo.

Viaj paŝoj resonas,
kvazaŭ oni persekutus vin,
kaj viaj ombroj sekvas al vi.

Sed tiam la frido spite tion
penetras sub vian haŭton
kaj via morna obtuza sento perdiĝas.
Tiam vi rigardas la stelojn.

Vi rememoras, ke vi estas stelinfano.

Vi estas ja farita el stelopolvo.

Via patrio estas la kosmo.

Agrabla hejmecca sento inundas vin.

Kaj poste vi demandas vin tute mirigite,

kial vi estis ankoraŭ tiom deprimita

antaŭ nur kvin minutoj.

***PS:** Jen teksto, kiun mi verkis germane jam en la jaro 1988.*

Tombejaj anĝeloj

Ŝtona anĝeloparo staras
sur la urba tombejo en Altenburg.

Unu vango de la dekstra anĝelo,
preskaŭ la tuta mentono kaj nazduono
estas misformitaj ĝis nereconebleco.

Ĉar duono de lia buŝo ankoraŭ
ridetas kaj la bele formitaj okuloj
estas nedetruitaj, li rigardas tiel,

kvazaŭ li volus diri al ni:

Ili disŝiris vangon de mi,
sed la bonecon en mi, la anĝelon en mi,
tiun ili ne povis disŝiri!

Tiu vetere detruata anĝelo, kiu aspektas,
kvazaŭ trafis lin grenado,
ĉirkaŭbrakas kun siaj fortaj brakoj
gardante la alian anĝelon.

Li premas disŝiritan vangon je ties kolo
kaj afable rigardas min
kun preskaŭ nekomprenebla optimismo,
kvazaŭ li volus diri: Rigardu do al mi,

vi, mortotima homo, ankoraŭ en mia disfalo
mi defendas lin, tiun anĝelon, kiu estas mia frato!

La alia, la ĉirkaŭbrakata anĝelo,
tenas sian plumpiĝintan dekstran manon antaŭ la ventro
kaj rigardas kun optimismaj okuloj en la sunon.

Rimarko: *Mi fotis kaj verkis tion unue germane en decembro
de la jaro 1987.*

Utila imago

Imagu,
ke vi sidas en domo malnova
sur trivita pluŝsofo
kaj kun la rigardo al kurbigita
blanke lakita ferolito.
Iu ĝuste forŝaltas la sunon
kaj alia alvenas kaj tranĉas
la koron el via brusto,
viro, kiu trovas ĝin plezuro
poste montri al vi la tranĉilon,
kaj sur manplato vian koron,
kiu batas ankoraŭ.

Imagu,
kiel vi miras pri tiu viro,
kiu havas falsan dentaron kaj aspektas
kiel la ludomastroj
en la tv-elsendaĵoj.
Vi devus esti morta delonge,
sed vi vivas plu kaj plu...

Imagu,
ke kreskas sur la vizaĝo de la viro
subite felo kaj, ke liaj okuloj
fariĝas strioj.

Kaj kaputa sondiskilo
komencas ludi:
„La fraŭlinon Madlejn'
mi vidis pro ben'
en banej' ... krk ... en scen'.
en banej' ... krk ... en scen'.

Imagu,
ke vi havas spegulon ĉe vi
kaj vi tenas la spegulon al la monstro,
kaj la monstro ridas kaj ridas,
ridas kun via koro en unu mano
kaj la tranĉilo en la alia mano.
Kaj la kaputa sondiskilo grate turniĝas:
Videblis gamba nud',
nuda prud'
en akva lud'.

Imagu, kiel la viro kun la falsa dentaro
aliras vin kaj vin tuŝas

per siaj spongecaj manoj,
kaj vi estas rigida kiel pupo,
kaj li ĵetas vin simple de la pluŝsofo
kaj vi kuŝas kun la rigardo
al la kurbigita ferolito
kaj la sondiskilo grate turniĝas
kaj la sondiskilo grate turniĝas
kaj la...

Imagu tion al vi,
ĝi povus esti utila por vi.

majo 1988

Vento, sablo kaj steloj

Mi, kiel nekristano, ŝatas, ja amas
malnovajn preĝejojn kaj tombejojn,
kompreneble ankaŭ maljunajn kverkojn,
ĉu ne strange?

Antaŭuloj de mi
estis francaj hugenotoj,
kiuj fuĝis al Prusujo,
eble tial tio estas en mi
kaj tuŝas en mi kordojn...

Ni estas ja ĉiuj nur
la produkto de ĉio tio,
kio estis antaŭ ni,
kaj ni ĉiuj estas
el la sama materio;
ni estas faritaj el stelopolvo,
kaj tiu stelopolvo neniam mortos,
nur ni mortos por poste vivi plu en io alia.
Tio estas ne nur deziro de mi, sed scienca vero.

Eble nia mio estas nur orgojla imago,
fantaziprodukto de nia koruptita cerbo.

Eble ni estas en vero nur stelopolvo...

Mi ne mirus pri tio...

Mi prefere estus vento,
sablo kaj steloj.

Tio estus pli simpla
ol esti homo.

R-E-D-A-K-T-O-F-I-N-O

28.11.2016

La kolekto tute ne estas kompleta, tial mi aldonas
ĉiusemajne novajn tekstojn. (cez)